

Janmajeno

Janmajeno aŭ “Jan Mayen” estas insulo en la Gronlanda maro, je ĉ. 500 km de Gronlando. Ĝi longas ĉ. 56 km kaj larĝas ĉ. 14 km, la tuta surfaco estas 373 km².

La insulo konsistas el du ĉefaj partoj Nord-Jan kaj Sør-Jan, kiujn interligas terkolo. Ĝi estas parte glaĉierkovrita.

La plej alta pinto de la insulo troviĝas en la norda parto kaj tiu estas la pinto de la Beerenberg-vulkano (2277 m), kiu lastfoje erupciis en 1732.

La suda parto estas montetplena. La senplanta insulo ne havas havenon, la klimato estas nebula kaj ŝtorma, la temperaturaj averaĝoj etendiĝas de la decembra -32 °C al la julia 10 °C. Sur la malgranda tundro vivas kelkaj vulpoj.

Verŝajne la insulo estis malkovrita de Henry Hudson en 1607, dum esploro al la nord-orienta pasejo al Hindio. En 1612 la nederlandanoj Jan Jansz Kerckhof kaj Jan Jacobs May van Schellickhout “remalkovris” la insulon. Oni nomis la insulon laŭ la lasta persono Jan Mayen. Ĝis ekstermo de la gronlandaj balenoj kaj morto de 7 balenĉasistoj pro skorbuto, ĝi funkciis kiel balenĉasa apogstacio (1642).

En 1882-83 funkciis tie aŭstra meteorologia stacio en kadro de la 1-a Internacia Arktika jaro.

Norvegio establis tie en 1921 meteorologian kaj radiostacion kaj la 8-an de majo 1929 anektis ĝin.

Dum la dua mondmilito, funkciis tie usona meteorologia stacio, poste en 1958-59, la NATO establis tie alflugejon. La radistacio transformiĝis en 1970 je aernaviga centro.

Jan Mayen estas nelogata krom la skipo de la stacio.

Retpaĝo: www.traduki.de

Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Janmajeno